

BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

En la numero:

FRUKTODONA
RAPORT-ELEKTA
KAMPANJO

•
UNUA RENKONTIĜO
DE E-ĤOROJ

•
KIK — CELOJ, SPER-
TOJ, REZULTOJ

•
TAGOJ DE IEK-
PISANICA

•
SOLENA CELEBRO
DE „STURMULO”

•
POETO-
ROMANTIKULO

•
LITERATURA KON-
KURSO DE „BE”

•
JUNA
ESPERANTISTO

•
NI RECENZAS

•
ENLANDA MOVADO



Tagoj de la Internacia E-Kursejo

(26. 9. — 2. 10. 1984)

Por unua fojo dum sia nelonga historio la Internacia E-kursejo (IEK) organizas sian feston — „Tagojn de la Kursejo“, lige kun la 10-a datreveno de IEK kaj de Internacia Tago de Turismo.

Ceestis reprezentantoj kaj gvidantoj de diversaj turismaj kaj internaciaj E-organizaĵoj kaj multaj gastoj el Anglio, Aŭstrio, Bulgario, GDR, Japanio, Hungario, Pollando, Sovetunio, Svedio, reprezentantoj de BEA, BEK kaj de la Nacia Eksperimenta Lernejo.

La 27-an de septembro matene la vic-urbestro de Smoljan k-do Minev akceptis la partoprenantojn. En sia mallonga parolado pri la historio de urbo Smoljan kaj la distrikto, li rakontis pri la atingoj dum la lastaj jardekoj kaj pri la konstruado de la nova urbocentro. Li respondis al ĉiuj demandoj, starigitaj fare de la partoprenantoj. La ĉefdirektoro de la Kursejo ing. Angel Todorov donacis al la urbestro kristalan vazon kun surskribo „Tagoj de la Internacia Esperanto-kursejo — septembro'84“.

Posttagmeze okazis la solena malfermo de la festo. Venis gastoj el la Distrikta Komitato de BKP kaj la prezidanto de DK de BEA k-do Maĉokov.

En sia parolado ing. Todorov interalie diris: „Unu el la plej gravaj atingoj dum la 75-jara ekzistado de BEA estas la fonda de la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK). La bulgaraj esperantistoj, dank' al la malavara helpo de la ŝtato, konstruigis sian belegan domon, kies destino estas: instruado de Esperanto al bulgaroj kaj eksterlandanoj; organizado de kursoj por preparo de spertaj E-instruistoj kaj ankaŭ de diversaj aliaj kursoj, seminarioj, renkontiĝoj; organizado de ekskursoj por bulgaraj kaj eksterlandaj esperantistoj, kiuj deziras ĝui la belecon de nia lando; altiro de novaj esperantistoj kaj amikoj de Esperanto; organizado de grupaj kaj individuaj vizitoj de E-kongresoj, festoj, konferencoj, seminarioj kaj aliaj aranĝoj eksterlande.“

Sekvis salutparoloj fare de multaj partoprenantoj. Speciala salulettero estis ricevita de la Estraro de UEA, subskribita de ĝia ĝenerala sekretario s-ino Flóra Szabó.

La taga programo finiĝis per tre agrabla Interkona Vespero.

Dum la sekvaj tagoj okazis kunsidoj kun la estraro de „Monda Turismo“ kaj la partoprenantoj havis eblecon konatiĝi kun la ap-

likado de la Esperanto-turismo en diversaj landoj dum la jaroj 1983—1984 kaj kun la perspektivoj por la periodo 1985, 1986, 1987 lige kun la 100-jara jubileo de Esperanto.

Oni akceptis kunordigajn planojn por turisma agado per Esperanto, internacian programon de la turisma servo „Esperantotur“, de la Internacia Esperanto-Asocio „Monda Turismo“.

Rezulte estis subskribitaj kontraktoj por turismaj interŝanĝoj inter Bulgario, Hungario, Pollando, Svedio.

Unuanime oni decidis okazigi venontjare simpozion „Esperanto en la Internacia Turismo“ (11—17. 9. 1985 en la Internacia Esperanto-Kursejo en ripozejo Pisanica apud Smoljan, Bulgario), kunorde kun la asembleo de la Monda Turisma Organizo, kiu okazos en Sofio, en septembro 1985.

La partoprenantoj havis la eblecon viziti la novan centron de urbo Smoljan, la domon de Diĉo Petrov en vilaĝo Progled, urbon Ĉepelare kaj la folkloran muziklernejon en vilaĝo Siroka Laka.

Dum la Tagoj okazis la unua prezento de la filmo pri la 36-a IFEF-kongreso kaj de la filmo de Bulgara Televido „Leciono de Esperanto“. Por la partoprenantoj estis prezentita riĉa kultura programo.

En la lasta tago okazis malfermo de ekspozicio de pentristoj-esperantistoj.

Enkadre de la Tagoj la ĉeestantoj havis la eblecon viziti la Internacian Teknikan Foiiron en Plovdiv kaj promeni en la malnova urbo-parto.

Fine ili konatiĝis kun la turismaj kompleksoj „Oraj Sabloj“ kaj „Albena“, vizitinte la filion de IEK en Varna.

A. T.

INFORMO DE LA TURISTA SEKCIO ĈE BEA

La estraro de la Turista Sekcio ĉe Bulgara Esperantista Asocio dum sia lasta kunsido aŭdis informon pri la anoncita konkurado okaze de la kongreso de BEA en 1985. La estraro decidis, ke la Turista Sekcio aktive partoprenu la anoncitan antaŭkongresan konkuradon. Ĝi invitas la estrarojn de la ceteraj asociaj sekcioj fari la samon.

Ni periode informados vin pri la antaŭkongresa aktivado de la Turista Sekcio.



BULGARA ESPERANTISTO

ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO

JARO 53
NOVEMBRO
II • 1984

FRUKTODONA ANTAŬKONGRESA RAPORT-ELEKTA KAMPANJO

DIMITAR PAPAZOV,
sekretario de BEA

Laŭ decido de la Buroo de BEA fine de la pasinta jaro kaj en la komenco de la kuranta jaro okazis la raport-elektaj kunvenoj de la E-societoj kaj la raport-elektaj konferencoj de la distriktaj E-organizaĵoj. Oni tre zorgeme faris la anticipan preparlaboron por sukcesa okazigo de la raport-elekta kampanjo. En plenkunsidoj de DE de BEA estis akceptitaj planoj por preparado kaj okazigo de la raport-elektaj kunvenoj kaj konferencoj. Estis antaŭviditaj la eventualaj membroj de la komisionoj por organizo de la preparlaboro. Oni priparolis la kvalitojn de la malnovaj kaj novaj aktivuloj en la distriktaj estraroj, elserĉante la plej agemajn kaj kapablajn. La membroj de la Buroo de CE de BEA estis distribuitaj laŭ distriktoj kaj starigis kontaktojn kun la distriktaj estraroj. Estis farita laborplano de la kunvenoj en la apartaj E-societoj. La kampanjo pasis laŭ la anticipe akceptita plano. La raportoj de la distriktaj estraroj estis enhavoriĉaj, il analizis la agadon dum la raport-elekta periodo.

La projekto-rezolucioj kaj programoj, akceptitaj en la kunvenoj kaj konferencoj estis bone pripensitaj kaj konkretaj, ĝuste montris la direktojn de la estonta agado. La eldiroj estis cel-direktitaj, estis elektitaj novaj kaj perspektivaj kadroj. La statistikaj esploroj montras, ke el entute 93 prezidantoj, vic-prezidantoj kaj sekretarioj de distriktaj estraroj 4 ankoraŭ ne atingis 30 jarojn, 23 estas 30-40 jaraĵ, 23 — 40-50-jaraĵ, 17 — 50-60-jaraĵ, 20 — 60-70-jaraĵ kaj 6 — pli ol 70 jarojn aĝaj. Impresas la fakto, ke multaj el ili havas malantaŭ sia dorso grandan sperton en la socia agado. La monatoj pasintaj post la raport-elekta kampanjo montris, ke la aktivuloj, gajnintaj la fidon de la esperantistoj, pravigos ĝin.

Nun ni estas en la antaŭvespero de la 41-a kongreso de BEA, kiu okazos en julio 1985. Lige kun la kongreso la Buroo de CE de BEA prenis decidon pri okazigo de la raport-elektaj kunvenoj de la E-societoj de la 1.XII.1984 ĝis 15.II.1985 kaj de la distriktaj konferencoj — de 15.II.1985 ĝis 31.III.1985. La kunvenoj de la E-societoj devas transformiĝi en sinceran konversacion pri tio kiel aktivigi ilian agadon, kion entrepreni por ne postresti en la antaŭkongresa konkurado. En la kunvenoj oni devas elekti delegitojn por la distriktaj konferencoj, laŭ normaro, difinita de la distriktaj estraroj. En la distriktaj konferencoj mem, kiuj ne havos raportan karakteron, estas dezirinde pri-trakti iun gravan problemon, ekzemple, pri la instrulaboro — agado tre grava por la estonto de la E-movado en nia lando, kaj oni devas elekti delegitojn por la kongreso. Laŭ la difinita normo, al 10 regulaj membroj de BEA (t. e. kiuj pagis sian membrokotizon por la koncerna jaro) oni rajtas elekti 1 delegiton. Oni notu, ke proporcie al la membroj de BEA — lernantoj kaj studentoj, devas esti elektitaj delegitoj-studentoj, ilin oni nenioakaze devas anstataŭigi per civitanoj. Oni devas turni apartan atenton al pagado de la membrokotizo. La distriktaj estraroj kaj la E-societoj devas agi respektive kaj ĝustatempe enkasigi la koncernan procenton el la membrokotizoj en la kancelario de CE de BEA.

La antaŭstarantaj raport-elektaj kunvenoj kaj distriktaj konferencoj certasence estas daŭrigo de la raport-elekta kampanjo, kiu tre sukcese pasis dum la printempo. Ni ne dubas, ke same tiel sukcese pasos ankaŭ la antaŭstarantaj raport-elektaj kunvenoj kaj konferencoj, por ke ni povu dece sin prepari por la 41-a kongreso de BEA.

Problemoj de la E-instruado

La instrulaboro en nia lando ĉiam ankoraŭ ne estas kontentiga. Multaj el la kursanoj forlasas la kursojn antaŭ la fino de la lernoĵaro.

En daŭro de pli ol dek jaroj tra la someraj internaciaj instruistaj E-kursoj en Meden Rudnik, distrikto de Burgas, pasis pli ol 2000 instruistoj el Bulgario kaj alilando. Bedaŭrinde, el ili diplomigis ne pli ol 200 personoj.

Nun ankaŭ la Internacia Esperanto-Kursejo (IEK) organizas porinstruistajn kursojn en Pisanica kaj Varna, sed la nombro de spertaj instruistoj ĉiam ankoraŭ estas nesufiĉa, ĉar post la enkonduko fare de la Ministerio de Klerigado de fakultativa lernado de Esperanto en la lernejoj, la bezono de instruistoj eksterordinare kreskis.

Por venki tiun baron la Sofia Distrikta Estaro de BEA, kune kun la Kleriga Fakto, organizis specialan distriktan ĉeestan-forestan E-kurson por preparo de instruistoj. Post dujara funkciado de la kurso jam estas pretaj multaj instruistoj kaj en la kuranta jaro oni ne instruis Esperanton nur en kvin mezlernejoj en Sofia distrikto. En ok bazaj lernejoj la fakultativa instruado de Esperanto daŭras plu.

Ankaŭ por la fakultativa instruado en la lernejoj ĉiam ankoraŭ estas multaj baroj: indiferenta rilato de iuj direktoroj kaj instruistoj al Esperanto; metodikaj kaj lingvaj problemoj de la instruistoj; nesufiĉa metodika kaj organiza helpo ktp.

Se la bulgara esperantista movado ne sukcesos venki tiujn barojn, en proksima tempo la fakultativa lernado en la lernejoj estos endanĝerigita.

Pro tio tre grava tasko staras antaŭ la bulgara esperantista movado dum la venonta 1984/1985 lernoĵaro lige kun la fakultativa instruado kaj eĉ lige kun la ĝenerala esperanta instrulaboro:

Unue, la centra, distriktaj kaj societaj estaroj devas objekte pritaksi la rezultatojn de la lernado dum la pasinta lernoĵaro;

Due, oni devas organizi postdiploman kvalifikadon de la instruistoj kaj kursgvidantoj por plialtigi la nivelon de la instruado, ĉar se la bulgara esperantista movado ne sukcesos meti la E-instruadon en la lernejoj sur la nivelon de fremdlingva instruado, ĝi ne povos atingi bonajn rezultojn.

Oni devas interesiĝi ankaŭ pri novaj metodoj de instruado kaj ĉion bonan apliki ĉe ni.

Trie, la rezultoj de la E-instruado en la lernejoj sen amase organizita Esperanto-vivo de la lernantoj ekster la klasoj estas anemia, senfrukta kaj ne longedaŭra.

Pro tio la aktiva agado de la lernejoj esperantistaj kluboj, la ligo de la kluboj de Internacia Amikeco (KIK) kaj „Standardo de la paco“ fariĝos efektive faktoro de amikeco, frateco kaj paco trans la limoj. Kaj se tiu junulara organizaĵo organizas internacian feriadon, sporton kaj internaciajn laborbrigadojn en esperantista medio, la kulturaj kaj politikaj rezultoj sendube sekvos.

Do, problemoj tre grava staras nun antaŭ la bulgaraj esperantistoj — nome la preparo de instruistoj. Se tiu problemoj ne estos solvita dum unu-du jaroj, la fakultativa lernado fiaskos, pro kio la historio punos la bulgaran esperantistan movadon.

Krome, atendas solvon la tasko pri novaj lernolibroj por la unua kaj dua gradoj. Konsidere al la nova metodika laboro en la lernejoj estas necesaj diversaj instruhelpiloj ktp.

Sur tiu bazo la konkurado inter la apartaj instruistoj, lernejoj kaj esperantistaj kluboj povas ludi gravan rolon, kio ne devas esti subtakata.

ZAĤARI IVANOV

Ordeno por Kiril Draĵev

La 1-an de oktobro j.k. en la Domo de Journalistoj — Sofio, en ĉeesto de respondecaj reprezentantoj de la Unuiĝo de Journalistoj, Unuiĝo de Aktoroj kaj de BEA okazis solena honorigo de Kiril Draĵev lige kun lia 80-jariĝo.

Nikola Aleksiev, E-veterano, rakontis mallonge pri la vivovojo de Kiril Draĵev kiel multjara ĵurnalisto kaj esperantisto. Post tio la prezidanto de BEA Hristo Gorov tralegis la decidon de la Stata Soveto de PR Bulgario pri distingo de Kiril Draĵev per la ordeno „Ruĝa standardo de laboro“. UEA deklaris lin sia Honora Membro pro liaj meritoj kiel gvidanto dum 25 jaroj de la Bulgara Esperanto-Teatro

(BET).

Salutleteron en la nomo de la Unuiĝo de Journalistoj tralegis ties estrarano Todor Stojanov.

Sekvis salutletero de la Unuiĝo de Aktoroj, tralegita de la popola aktorino Tanja Masalitinova.

La aktoro St. Stajĉev rakontis pri la gvidrolo, kiun ludis Kiril Draĵev kiel organizanto, tradukanto kaj kursgvidanto de BET.

La jubileulo varme dankis al la Stata Soveto kaj al la organizaĵoj, kiuj honorigis lin kaj al la ĉeestantoj.

„B. E.“

KIK — CELOJ, SPERTOJ, REZULTOJ

La ĉiujare okazantaj konsultiĝoj de Esperanto-Asocioj de Socialismaj Landoj plurfoje substrekis la neceson bone kaj efike kvalifiki la funkciulojn de siaj organizaĵoj, por ke ili sur alta nivelo — politike, lingve kaj movadoscie — povu labori por la realigo de taskoj starigitaj de la unuopaj landaj asocioj, kaj tio substrekenda, ankaŭ en la komuna intereso de asocioj de la socialismaj landoj. Pro tio oni interkonsentis starigi kursojn, kiuj okazu unufoje ĉiujare kaj daŭri 10—14 tagojn. Ili per prelegoj kaj seminarioj disponigu al la partoprenantoj ampleksajn sciojn pri la ĉefaj politikaj, sciencaj kaj movado-praktikaj aspektoj de la aktuala Esperanto-movado en socialismaj landoj kaj en la tuta mondo.

La unua „Konstanta Internacia Kvalifikejo“ (KIK) bonsukcese okazis en 1983 en Varna. Partoprenis aktivuloj de landaj asocioj el Bulgario, ĈSSR, GDR, Hungario, Pollando kaj Vjetnamio. Ĉeflektoris d-ro Vlastimil Novobilski kaj Milan Zvara el ĈSSR.

La dua KIK, do KIK'84 okazis de la 3-a ĝis la 12-a de septembro 1984 en la Internacia Esperanto-Kursejo en Pisanica. Partoprenis 25 funkciuloj el Bulgario, ĈSSR, GDR kaj Hungario. La ĉeflektoroj estis Wera Dehler kaj d-ro Detlev Blanke el GDR, kiuj kune kun Nikola Aleksiev, Jordan Angelov, Marin Băcev, Dončo Hitrov kaj Kunčo Vălev entute prezentis 25 prelegojn.

Jen la ĉefa enhavo. Nikola Aleksiev resumis la internacian politikan situacion kaj ties influon sur la internacian kunlaboradon, elstarigis la rolon de Esperanto en la pacmovado kaj aparte skizis la tradiciojn kaj influojn de la laborista Esperanto-Movado. Marin Băcev pritraktis la pedagogiajn valorojn de Esperanto. Jordan Angelov prelegis pri problemoj de varbado, edukado de kadruloj kaj informis pri la Bulgara Esperanto-movado. Dončo Hitrov skizis problemojn kaj donis praktikajn ekzemplojn pri efika informado pri Esperanto kaj ties sociutila aplikado. Kunčo Vălev prezentis ĉefajn faktojn en la historio de la Esperanto-movado kaj el la vivo de Zamenhof. Wera Dehler prelegis pri kondiĉoj de efika publika parolado kaj bona prononcado kaj traktis la aplikon de Esperanto en fakaj terenoj; ŝi prezentis aparte la problemojn de sistema kreado de fakaj terminoj en Esperanto surbaze de la spertoj kaj rezultoj de la internacie evoluintaj terminologiaj aktivecoj kaj sciencaj konoj. Detlev Blanke, kiu gvidis la seminarion, montris ligojn inter marksismo-leninismo kaj la lingvo-problemo, resumis kaj pritaksis la provojn pri kreado de

planlingvaj projektoj kaj traktis ĉefajn problemojn de interlingvistiko kaj esperantologio. Li skizis problemojn el la evoluo de UEA, TEJO, MEM kaj SAT, prilumis la rilatojn inter UEA, UNESKO kaj aliaj interŝtataj kaj neregistaraj organizaĵoj. Li krome montris specifajn kaj komunajn trajtojn de la Esperanto-movado en la kondiĉoj de socialismo, menciis problemojn



Lektoroj kaj partoprenantoj en KIK'84 en Pisanica

de kunlaboro kaj gvidis diskuton pri praktika agado de la movado sur regiona kaj loka niveloj. La prelegojn, kompreneble, sekvis ofte tre vigla diskutado kaj spertintersaĝo de la partoprenantoj.

Sed ne nur temis pri serioza laboro. Ankaŭ estis tempo por ekskursoj al Smoljan (observatorio, etnografia muzeo), Pamporovo kaj aliaj pitoreskaj lokoj. De granda valoro estis la multaj du- kaj plurpersonaj diskutoj kaj spertintersaĝoj. Ne mankis amuzaj vesperoj kun dancado en la diskoteko kaj ekskursoj posttagmezaj en la belega ĉirkaŭaĵo de Pisanica.

La 9-an de septembro 1984, nacia bulgara festotago, pro la 40-a datreveno de fondiĝo de la bulgara socialisma ŝtato, la seminarianoj per prelego omaĝis al socialisma Bulgario, kiu dum kvar jardekoj evoluis al riĉa, alte takata, bone prosperanta ŝtato, fidinda membro de la socialisma ŝtataro.

La unika Internacia E-Kursejo mem estas elokventa pruvo pri la sukcesa vojo, kiun kunpaŝis kreive kaj bonkontribue la bulgaraj esperantistoj.

La vere bonegaj laborkondiĉoj, la ĉiufanka subteno flanke de la gvidantaro de BEA kaj de la Kursejo, la amika etoso, la granda interese- siteco kaj kundiskutemo de la seminarioj certigis la altan nivelon kaj bonan sukceson de KIK'84.

Dum la seminario fariĝis tre evidenta la neceso de similaj regule organizotaj kvalifikaj kursoj por funkciuloj de niaj kunlaborantaj E-asocioj.

DETLEV BLANKE
WERA DEHLER

Solena celebrazo de „Sturmulo“

En n-ro 9/1984 de „Bulgara Esperantisto“ aperis artikolo pri la nelegala E-gazeto „Sturmulo“ („Fidela helpanto de la Partio“, de Dimităr Papazov). Nun ni donas lokon al informo pri la solena celebrazo de la duonjarcenta jubileo de tiu gazeto-batalanto, okazinta la 28-an de septembro j. k. en Plovdiv.

Por la festado de tiu datreveno la plovdivaj esperantistoj laboris multe kaj fervore. Impresis la konvena por la okazoliteratura-muzika programo. Kiam la ĉeestantaj iamaj organizantoj kaj kunlaborantoj de „Sturmulo“ okupis siajn lokojn en la prezidantaro, kantgrupo ĉe E-societo „Lumo“ per kantoj salutis la iaman redaktoron de „Sturmulo“ Hristo Gorov — nun prezidanto de BEA, la pasian disvastiganton de la internacia lingvo inter laboristoj en la pasinteco Ivan Sivarov, la aktivajn membrojn de LEA el Asenovgrad Atanas Gaev kaj Dimităr Andreev, la kunlaboranton de „Sturmulo“ Hristo Kanev.

La aktorino Veselina Kurteva deklamis du poemojn de Hristo Gorov, publikigitajn en la gazeto: „Proleta serenado“ kaj „Bulvarda bildo“.

Raporton pri la historio de „Sturmulo“ faris la prezidanto de DE de BEA en Plovdiv Jordan Angelov. Post tio Hristo Gorov interesis la aŭditorion per detaloj pri la eldonado, disvastigado kaj malpermeso de „Sturmulo“.

En la nomo de la juna ĵurnalista E-generacio Maria Jankova-Bojaĝieva — redaktoro en revuo „Bulgara Esperantisto“, dankis al la veteranoj-ĵurnalistoj pro la riĉa heredaĵo el progresemaj E-periodaĵoj, kiujn ili postlasas, kaj esprimis la pretecon de siaj gekolegoj daŭrigi la demokratiajn tradiciojn de la bulgara E-gazetaro.

Bonan finon de la festo donis la junaj plenumantoj el la artgrupo ĉe E-societo „Kulturo“. Ilia komponaĵo el versoj kaj kantoj sub la komuna titolo „La revo estiĝis realo“ kaptis la publikon.

La partoprenantoj en la celebrazo metis florkronon antaŭ la Frata Tombejo en Plovdiv.

MARIA TODOROVA

UNUA RENKONTIĜO DE E-ĤOROJ

La 21-an—29-an de aŭgusto j.k. en IEK-Pisanica okazis Unua Renkontiĝo de E-Ĥoroj. Partoprenis la Sofia E-Ĥoro, la Ensemblo de Malnovaj Kantoj el Pedagogia Altlernejo en Bydgoszcz (Pollando) kaj Junulara Ĥoro de Budapeŝta Trafika Entrepeno (Hungario). La Ĥoro de Helena Esperanto-Asocio, kiu same devis partopreni la Renkontiĝon, bedaŭrinde, ne alvenis pro malsaniĝo de la ĥorestro Hristo- foros Joanu.

Nia restado en la Internacia E-Kursejo daŭris sep tagojn. Laŭ la programo, ĉiutage okazis kursoj de Esperanto por komencantoj kaj progresintoj, la ĥoroj kune provkantis sub la gvidado de la ĥorestro-dommastro Dimităr Terziev.

En tre intima etoso pasis la interkona vespero, la koncertoj de la pola, hungara kaj bulgara ĥoroj kaj la adiaŭa vespero. Ĥorestroj

kaj ĥoranoj interŝanĝis sperton, donacojn, memoraĵojn.



Koncertas la koruso el Pollando

La 26-an de aŭgusto la ĥoroj donis koncerton en Smoljan. Partoprenis ankaŭ la infana dancensemblo el Toruń, kiu sin prezentis per belaj polaj popoldancoj. La koncerto finiĝis per tri kantoj, plenumitaj de la kolektiva E-ĥoro.

La sekvan tagon, 27-an de aŭgusto, la sama programo estis prezentita en Pamporovo antaŭ multnombra publiko el bulgaroj kaj alilandanoj.

Plej solena momento en la Renkontiĝo de E-ĥoroj estis la koncerto, dediĉita al la 40-jariĝo de la socialisma revolucio en Bulgario. Ĝi estis prezentita la 29-an de aŭgusto en Sofio, en la Nacia Palaco de Kulturo „Ljudmila Jivkova“. Laŭvice sin prezentis la Sofia E-ĥoro sub la gvidado de sia ĥorestro Dimităr Terziev, kun kantoj dediĉitaj al la granda jubileo. Sekvis belegaj plenumoj de la ĥoro de Malnovaj Kantoj el Pedagogia Altlernejo en Bydgoszcz sub la gvidado de la ĥorestro Jan Lach kaj de la infana popolensemblo el Toruń. La Hungara Junulara Ĥoro el Budapeŝto, kun ĥorestro Gabor Timko, plenumis

tre bone kaj precize kvin kantojn, precipe de hungaraj komponistoj.

La prezidanto de BEA Ĥristo Gorov enmanigis al la ĥorestroj diplomojn pro la partopreno de la ĥoroj en la renkontiĝo kaj en la koncertoj. Fine per tri kantoj sin prezentis la kolektiva E-Ĥoro sub la gvidado de la ĥorestro-dommastro Dimităr Terziev: „Paca kanto de la esperantistoj“, „Ekflugu nia Esperanta kant!“ kaj „Ĥimno de la ĝojo“ de Beethoven. Ankaŭ la infana kantgrupo „Diverskoloraj kravatoj“ aperis sur la scenejo post la dua kanto. Sub la gvidado de Petăr Rusinov ili plenumis mallongan programon en Esperanto. Poste la infanoj disdonis rozojn al la ĝeĥoranoj kaj kantis kune kun ili la „Odon de ĝojo“.

Tiel pasis la Renkontiĝo de E-Ĥoroj, iniciatita kaj realigita de la ĥorestro de la Sofia E-Ĥoro Dimităr Terziev. Ni forte esperas, ke ĝi ne estos lasta, ke nia devizo „Kuniĝu ni per nia kant!“ sonos ankaŭ estonte dum pluraj similaj renkontiĝoj.

LILI DOKOVA

AKTIVECOJ DE LA SOFIA E-HORO

Laŭ invito de Monda Turismo, komence de junio ĉi-jare la Sofia E-Ĥoro partoprenis en la Konferenco de Monda Turismo, organizita en urbo Bydgoszcz enkadre de la Tagoj de Bydgoszcz.

En Toruń la Sofia E-Ĥoro partoprenis la Festivalon de la Popol-ensambloj. Sur granda subĉiela podio sin prezentis diversaj popolensambloj. Post la programo la Sofiaj ĥoristoj salutis la partoprenantojn per tri kantoj. Ni ŝvingis rozojn, kiam ni kantis „Roza Valo“, kaj la rozodoro memorigis pri la lando de rozoj.

La sekvontan tagon ni alvenis en Bydgoszcz. La konferenco de Monda Turismo kaj la koncertoj okazis en la salono de Kulturdomo „Bartosz“. Je nia dispono dum la tuta semajno estis busoj.

Ĉe la solena malfermo de la konferenco la

E-ĥoro plenumis sep kantojn antaŭ plenplena salono — poloj kaj eksterlandanoj.

La vesperon de ĥoroj partoprenis la Ĥoro de Malnovaj Kantoj el Pedagogia Altlernejo en Bydgoszcz, la Sofia E-Ĥoro kaj Junulara Ensemblo el Bydgoszcz. Ni plenumis dek du kantojn kaj ricevis rekompence ŝtormajnplaudojn kaj donacojn de la organizantoj.

En nia libera tempo ni havis la eblecon konatiĝi kun la vidindaĵoj de la urbo — monumentoj, preĝejoj, stratetoj en la Malnova Urbo. . . Ni ankaŭ vizitis per busoj la urbojn Gdansk, Gdinja kaj Sopot.

La lastan, adiaŭan vesperon sin prezentis la plej bonaj ensambloj. La Sofia E-Ĥoro partoprenis la koncerton kaj ricevis diplomon, transdonitan de la organizantoj al la ĥorestro Dimităr Terziev.

LILI DOKOVA

NOMBRO DE LA ESPERANTISTOJ EN LA MONDO

Antaŭ kelkaj jardekoj, kiam estis bona konjunkturo por Esperanto, la konata usona lingvisto prof. Mario Pei fiksas la nombron de la esperantistoj en la mondo je 12 milionoj. Prof. Pierre Janton, kiu instruas la anglan kaj Esperanton en la universitato de Clermont-Ferrand, opinias, ke nun estas entute inter 2 kaj

3,5 milionoj da esperantistoj en la mondo. Sed tiu nombro estis publikigita jam antaŭ kelkaj jaroj kiel „Franca Esperantisto“ (n-ro 351, marto-aprilo 1984, p. 1) indikas.

Do, kiom da esperantistoj estas en la mondo, ĉiam nur povas esti difinate tre necerte. (El „Interlingvistika Informa Servo“, n-ro 2/1984)

POETO-ROMANTIKULO

(Okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Petăr Jordanov)

Sian meritan lokon en la monda E-poezio devas okupi la verkaro de Petăr Jordanov (1884—1952), naskita en Veliko Târnovo. Elstara E-aganto, li estis dotita per sentema naturo kaj lirika talento. Sur la literatura kampo li debutis per E-traduko de „Soneto” de la bulgara poeto-simbolisto Kiril Ĥristov, publikigita en revuo „Rondiranto”, n-ro 4, 1904. Kiam la esperantistoj de Veliko Târnovo komencis eldoni en 1907 la revuon „Lumo”, sur ĝiaj paĝoj ofte aperis poeziaĵoj de Petăr Jordanov. Lia unua E-versaĵo „Al Veliko Târnovo!” („Lumo” — n-ro 6, 1907) estiĝis perlo de la bulgara E-poezio. Por ĝia popularigo kontribuis la libro de Cart kaj Pagnier „Esperanto en 10 lecionoj”, (tradukita bulgaringve en 1910), en kies suplemento ni trovas ĝin.

Petăr Jordanov estas poeto-romantikulo. („Soneto”, „Apud Nigra Maro”). Lia poezio estas aŭtobiografia: li ne povas venki la malfacilaĵojn kaj malamon, kio pravigas lian pesimismon („Blanka nokto”, „Elegio”, „Sen titolo”). La poeto trovas savon en fuĝo en la naturon: certan tempon li pasigas kiel bibliotekisto en la Rila-monaĥejo. Tie li verkas grandan parton de sia poezio. Socialan akcenton ni trovas en la versaĵoj „Al Veliko Târnovo”, „Preĝo”, „Ne plu cedi”, „Al bulgara patrino”. La ĉi-lastata, dediĉita al Ĥristo Haralambev — pereinta en la Balkana Milito (1912), elvokas imagon pri la grandeco de la patrino — simbolo de la patrolando, pri la homa heroaĵo kaj pri senmorteco.

Petăr Jordanov ĉerpas plenmane el la vortrezoro de la Internacia Lingvo. Li uzas majstrajn esprimojn kaj modelas frazojn melodijajn. La verso iras glate kaj ritme.

Petăr Jordanov faris kelkajn tradukojn. Krom la menciita „Soneto” de Kiril Ĥristov

li tradukis ankaŭ „Haĝi Dimităr” de Ĥristo Botev (1908) kaj la poemon „Paisij” de Ivan Vazov (1924), lige kun la morto de la popola poeto.

Tiu plej konsiderinda E-poeto en Bulgario en la jaroj antaŭ la Unua Mondmilito postlasis daŭran spuron. Bedaŭrinde, lia poezia heredaĵo (ĉirkaŭ 20 versaĵoj) troviĝas ankoraŭ nur sur la paĝoj de nia E-gazetaro. Ĝi estas nek en la Monda Antologio de E-poezio de W. Auld (1958), nek en la ĵus aperinta hungara eldono „Almanako de Bulgaraj Esperantistoj”. Nia devo estas kolekti kaj popularigi la poezian verkaron de tiu E-poeto.

OLGA GANKOVA

NE PLU CEDI!

Mi ĵetis mian liron melodian
kaj diris: mi ĉesigas mian kanton!
Riproĉis mi la mondon apatian
en fajron ĵetis mian revon sanktan.

Kaj longe ploris mi je mia sorto,
konsolon trovis nur en larma plendo.
Mi revis mian finon kaj pri l'morto
mi jam meditis en amora sento. . .

Ĉu falis mi rezigne kaj sen lukto?
Ĉu mia kredo, agoj, idealo,
ĉu vivo mia — restos do sen frukto?
Ne — tamen — ili estas ja realo.

Mi kredas je l'estont' per kredo forta,
je ĉi-estont' ne povas mi ne kredi.
Premite de la zorgo kaj de l'sorto
decidis tamen mi: ne cedi, ne plu cedi!

(1937)

PETĂR JORDANOV

FELIĈA KAJ FIERA MI ESTAS...

Tiu ĉi letero de Esperantina Triĉkova devis aperi en la julia n-ro de „Bulgara Esperantisto”, kiu respegulis la 85-jariĝon de Radoslav Triĉkov, solene notitan en majo de la kuranta jaro en Vraca. Bedaŭrinde, pro manko de loko, tio ne estis ebla tiam.

Ni publikigas ĝin nun, kvankam kun tre granda malfruigo. Samtempe ni kaptas la oka-

zon ankoraŭfoje saluti nian estimatan veteranon Radoslav Triĉkov.

Jes, vere tia mi estas, ĉar mia patro estas Radoslav K. Triĉkov, kies 85-jaran jubileon la socio en Vraca solene celebris ĉi-jare. Li instruis min ami la muzikon, adori la teatron kaj la poezion, sed la plej grava estas ke li estigis min esperantistino. Mi ne scias kiel

mi fariĝis tia, ĉar ekde mia naskiĝo mi parolas bulgare kaj esperante. Sajne mi naskiĝis esperantistino, ĉar la gepatroj estis tiaj.

Ce mia naskiĝo mia patro estas ricevinta amason da salutleteroj el ĉiuj partoj de la terglobo, kie li havis tiom multege da gekorespondantoj.

Mi lernis legi kaj skribi Esperanton jam en la unua klaso de la elementa lernejo kaj tiam mi miris, kial la ceteraj infanoj ne parolas tiun ĉi lingvon.

Por mi Esperanto estas la plej facila kaj bela lingvo, plene natura kaj kapabla klarigi al ĉiu homo la devenon de la vortoj fremdaj uzataj en la naciaj lingvoj. Al mi ĝi helpis pli bone percepti kaj asimili la francan lingvon, kiun mi lernis pli malfrue.

La vasta korespondado de mia patro komprenigis min, ke la mondo konsistas el diversaj nacioj, parolantaj malsamajn lingvojn, sed kunveninte en unu loko, ili perfekte interkompreniĝas per Esperanto.

Per la helpo de mia patro mi ekkorespondis kun infanoj samjaraj el diversaj landoj kaj tio fierigis min supermezure. Mi fieras eĉ nun — ĉar mi portas la belan nomon — Esperantina, kaj ĉar dum mia infaneco mi estis „centra figuro“ en multnombraj naciaj E-kongresoj. Tie mi deklamis, salutis, kantis kaj kolektadis la admiron kaj la aplaŭdojn de la ĉeestintoj. Ĉion ĉi mi ŝuldas al mia aminda kaj neesprimeble ŝatata patro.

Li instruis min ekami Esperanton kaj labori por ĝia triumfo, ekami nian laboreman popolon, nian pli grandan fraton — Sovetunion, malamegi la faŝismon.

Mi fieras, ke mi estas filino de la pioniro kaj veterano de la internacia Esperanto-movado Radoslav K. Tričkov, eksbatalanto kontraŭ la faŝismo kaj nun — aktivulo en ĉiuj sferoj de la politika kaj kultura vivo de nia lando.

JUNA ESPERANTISTO

PER ESPERANTO TRA NORDA AMERIKO

Ĉi-somere, laŭ invito de la Esperanto-Ligo pri Norda Ameriko (ELNA), mi havis la eblecon viziti Usonon kaj Kanadon (de la naŭa de julio ĝis la naŭa de aŭgusto). La ĉefa celo de mia vojaĝo estis partopreni diversajn Esperanto-forumojn, propagandi la agadon de Bulgara Esperantista Asocio kaj la kulturhistoriajn vidindaĵojn de nia lando, ankaŭ prelegi pri sismologiaj temoj, kio estas mia fako.

Por dekkvina fojo en la Stata Universitato de San Francisko okazis regulaj someraj kursoj pri Esperanto (25.06.—13. 07. 1984). Sub la gvidado de tri instruistoj — d-ro John Wells el Britujo, Nikola Rašić el Jugoslavio kaj d-ro Duncan Cartes 69 gekursanoj el Usono, Japanio, Suda Koreo kaj Aŭstralio studis Esperanton en 5 diversaj grupoj: 4 laŭ la lingvopovo kaj unu pri metodiko. La 12-an de julio mi prelegis antaŭ la kursanoj pri ĝeneralaj aspektoj de sismologio. La prelego estis akceptita kun granda intereso, ĉar ĉiuj ĉeestantoj loĝas en la plej sisma regiono de la mondo — la Pacifika. Okazis diskutado, dum kiu multaj aŭskultantoj rakontis pri sia „terrema sperto“ kaj pri siaj travivaĵoj.

La 14-an—19-an de julio en la Universitato de Portlando, ŝtato Oregonio, okazis samtempe la 3-a Tutpacifika Kongreso kaj la 32-a Kongreso de la Esperanto-ligo pri Norda Ameriko kun 125 partoprenantoj. La kongresa temo estis: „Esperanto — komunlingvo por multkultura komunumo de la Pacifiko“. Mi faris antaŭ la kongresanoj prelegon kun prezento de diapozitivoj, konigante al la aŭskultantoj la kulturon, historion, naturvidindaĵojn, atingojn en la konstruado de socialismo en Bulgario. Multaj el la ĉeestantoj estis partoprenintoj en la 63-a kongreso de UEA en Varna (1978) kaj jam konis nian landon. Ili ankaŭ esprimis siajn bonegajn impresojn pri la gastemo de nia popolo. La kongresaj organizantoj aranĝis ekskurson al la vulkano Saint Helens, kiu erupciis en 1980 kaj estas tre interesa objekto el geologia kaj geofizika vidpunkto. Dum la veturado mi parolis antaŭ la partoprenantoj pri diversaj problemoj de la vulkanismo kaj sismeco en la Pacifika regiono. Dank' al Esperanto mi kompletigis mian profesion kulturon, ĉar ĝis tiam mi ne havis sperton pri vulkanoj surloke.

La 21-an—28-an de julio mi partoprenis la 69-an Universalan Kongreson de Esperanto en Vankuvero, Kanado. Enkadre de la Somera Kongresa Universitato mi prelegis pri temo: „Nuntempa stato de la problemoj pri prognozo de tertremoj“. Mi konigis al la aŭskultantoj la eblecon prognozi terskualojn. En posta diskutado esperantistoj el Usono, Ĉinio, Japanio parolis

pri diversaj tertremoj, kiuj okazis en iliaj landoj, ankaŭ pri okazoj de alarmoj kaj evakuo post sukcese prognozitaj tertremoj.

Mi volas emfazi la gastemon kaj atenton flanke de la amerika esperantistaro. Ili havas intereson al la vivo de samideanoj el la tuta mondo kaj esprimis siajn amikajn sentojn rilate ilin.

DANIELA DENEVA

TURISTA MARŜO EN PIRIN-MONTARO



Vidaĵo de montaro Pirin

De 18-a ĝis 29-a de julio en la bela montaro Pirin efektiviĝis ekskursiva somerripozo, organizita de junaj esperantistoj el urboj Plevno kaj Plovdiv. La partoprenantoj estis el diversaj urboj de nia lando, precipe gejunuloj, kaj ankaŭ grupo de junaj polaj esperantistoj, kiuj kontribuis per sia ĉeesto por estiĝo de agrabla internacia etoso.

Ni restis du tagojn en la bela urbeto Bansko, situanta en la bazo de Pirin, kvar tagojn en montodomo „Banderica“, tri — en la tendaro „Vasilaŝki Ezera“ kaj du tagojn — en montodomo „Goce Delčev“.

Nia vojplano pasis tra la centra parto de la montaro, fama pro sia unika beleco, pro la pura, glacie malvarma akvo de la lagoj, rapidflujaj torrentoj, freŝaj verdaj herbejoj kun dissemitaj sur ili delikataj floretoj, kiuj beligas la severan pejzaĝon.

Ordinare nia taga programo antaŭvidis ekskursojn al interesaj turismaj objektoj kaj Esperanto-kurson.

La tuta grupo surgrimpis la plej altan pinton en Pirin — Vihren, havante la eblecon dank' al la bela kaj klara vetero ĝui la pa-

noramon, kiu malkovriĝas de tie. Unu pli malgranda grupo trapasis la faman selkreston „Končeto“ („Ĉevaleto“) kaj surgrimpis iujn aliajn, pli malfacilajn objektojn. Pirin estis favora al ni kaj ne kaŝis sian belecon malantaŭ la vualo el nebuloj, tiel oftaj en tiuj lokoj.

La vesperojn ni pasigis apud la fajro en la tendaro, kun kantoj kaj programo, kiun ni en la momento improvizis.

La plimulto el la gepartoprenantoj estis profesiaj muzikistoj kaj artistoj kaj tio kontribuis por estiĝo de vigla kaj agrabla etoso. Unu el ili — profesia gitaristo, gvidis kurson de gitaro por komencantoj.

Dum la marŝo ni organizis ankaŭ esperantajn iniciatojn — estis prezentita prelego pri la lingvo Esperanto kaj la monda esperantista movado kaj estis efektivigita E-kurso por komencantoj, kiu celis prezenti la bazajn regulojn de la lingvo, veki intereson pri la ideoj de la Esperanto-movado.

Nia ekskurso finiĝis en Dobriniŝte, kie ni havis la plezuron naĝi en la minerala baseno.

Mi opinias, ke la ekskursiva somerumado estas taŭga formo por efektiviĝo de junularaj esperantistaj iniciatoj — kursoj, seminarioj, lekcioj k.s. Grandan rolon por la bona kaj senincidenta pasado de similaj marŝoj ludas ankaŭ la sperta gvidado de la montar-gvidanto.

La organizado de similaj ekskursoj kontribuos por la amikiĝo de junaj esperantistoj el diversaj partoj de nia lando kun junuloj-esperantistoj el aliaj landoj kaj helpos nian komunan laboron sur la Esperanta kampo.

METODI ANGELOV

ATENTON!

En malproksima urbo Vladivostoko en Fora Oriento jam kelkajn jarojn ekzistas Esperantista klubo „Pacifiko“. Multaj membroj de nia klubo volonte reeĥas al ĉiu klubo aŭ persono, kiu interesiĝas pri nia regiono, pri nia urbo kaj volus havi bonajn kontaktojn.

Adreso de nia klubo: Esperanto-klubo, Dom molo-deĵi, Av. 100 let Vladivostoku 103, SU-690039 VLADIVOSTOK, Sovet-Unio.

Koncize pri la Konkurso de „BE“

Por la Internacia Literatura Konkurso de „Bulgara Esperantisto“ okaze de la 40-a jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario estis ricevataj 21 konkursaĵoj. El ili — unu el Sovetunio.

Jurio en konsisto: prezidanto — Hristo Gorov, poeto kaj publicisto, kaj membroj — Ljuba Bojaĝieva, poetino, Dončo Hitrov, ĵurnalisto, legis la konkursaĵojn kaj faris siajn pritaksojn. La rezultojn ni aparte publikigas.

Kion montris tiu ĉi konkurso?

Unue — tute malgrandan interesigon flanke de la legantaro de „BE“ pri la konkurso, pri kio atestas la malmultnombraj kontribuajloj. Evidentiĝis, ke niajn literaturajn konkursojn partoprenas unuj kaj samaj aŭtoroj, kiuj dum jaroj elmontras verkemon, malgraŭ ke la anoncita limdato de la konkurso disponigis al la interesigintoj sufiĉe longan tempon por verado.

Due — la temaro de la konkursaĵoj estas preskaŭ sensignifa, pala kaj ne provokas fortajn emociojn ĉe la leganto, ne kaptas lian atenton.

Trie — la lingva nivelo, ĝenerale dirite, estas malalta el vidpunkto beletra kaj grama-

tika. Tio rilatas kaj la prozaĵojn, kaj la poeziaĵojn. Evidentiĝas la nesufiĉa kono de la principoj pri versfarado: neĝustaj cezuroj, netaŭgaj apostrofoj, elipsoj kaj vortoj por atingi rimojn ktp. Preskaŭ la samajn rimarkigojn oni povas fari rilate la tradukitan poezion: ofte — laŭvortaj tradukoj senkonsidere de ritmo, rimoj, paŝoj kaj aldone gramatikaj eraroj. . .

Mi tute ne intencas enkonduki malesperigan, pesimisman tonon en tiujn miajn tre koncizajn pritaksojn de la prezentitaj konkursaĵoj, sed nur atentigi ties aŭtorojn pri iuj malperfektaĵoj, kiujn ili konsideru en sia estonta kreiva laboro. Tiuj rimarkigoj rilatas ĝenerale ĉiujn, kiuj emas okupiĝi pri poezio kaj prozo (originalaj kaj tradukitaj) en la Internacia Lingvo. Ĉar nia komuna tasko estas kreskigi kaj helpi spertajn, talentitajn Esperanto-aŭtorojn kaj tradukistojn — tre bezonatajn por nia Esperanto-verkado kaj agado.

Al ĉiuj partoprenintoj en la konkurso la redakcio de „Bulgara Esperantisto“ esprimas sian dankon kaj bondeziras al ili novajn literaturajn sukcesojn.

DONČO HITROV

LISTO DE LA PREMIITOJ

ORIGINALA PROZO: Unuan premion oni ne aljuĝis; Dua premio: **Asen Totev Linov** el v. Aleksandrovo (Loveĉ-distrikto) pro „Hel-panto“; **Ivan Sivarov** („Optimisto“) el Plovdiv pro „Oni povas ne ekzekuti vin“; **Dimo Trudoljubov** el Jambol pro „Okazintaĵo en Or-linci“; inĝ. **Maria Taŝeva** („Katja Esperanta“) el Sofio pro „Nomfesto en la policejo“; **Elena Popova** („Aŭroro“) el Tolbuhin pro „Memoro“; Tria premio: **Ivan Sivarov** („Pasporto 408848“) el Plovdiv pro „La sirenoj fajfas malalarmsignon“, „Septembraĵoj motivoj“, „Enteriga ceremonio“. Kuraĝiga premio: **Julia Vladimirovna Martinoviĉ** el Lvov (USSR) pro „L'primavero“.

ORIGINALA POEZIO: Unua premio: **Asen Totev Linov** el v. Aleksandrovo (Loveĉ-distrikto) pro „Vekiĝu“. Dua premio: **Rosica Georgieva** („Kolombo“) el Pazargik pro „Mia patrujo“, „La plej juna partizano“, „Asembleo de la paco“; **Penka Papazova** (Maria Nedelĉeva) el Jambol pro „Konversacio kun nokto kaj amo“. Kuraĝigaj premioj: **Atanas Kostadinov** (Nenko Radostinov) el Plovdiv pro „Aljoŝa“, **Boris Kavalĝiev** („Samtempulo“) el Ruse pro „40 jarojn socialisma Bulgario“.

TRADUKITA POEZIO: Unua, dua kaj tria premioj ne estas aljuĝitaj. Kuraĝiga: **Lilija Koleva** el Sofio pro „Katjuŝa“.

KONKURSAĴOJ

OKAZINTAĴO EN ORLINCI

(Rakonto)

Estis majo de mil naŭcent kvardek tria. La kamparo ĉirkaŭ vilaĝo Orlinci estis florplena. El la arbaro de la monteto Kara Bair venis facila vento, kiu milde karesis la spikojn de la tritikoj. En la aero ŝvebis kaj kantis

alaŭdoj. La suno brilis forte. La naturo triumfis pro sia pompa printempa beleco. Sed ne estis tiel en la homaj animoj. . .

Laŭ la vojo de la loko Ĉoban Ĉeŝme al la

vilago marŝis cigano, kiu kondukis grandan
brunan urson kaj mallaŭte kantis:

Havis kutimon Todora
iri vespere por akvo.
Iri vespere por akvo
al la hajduta fonteto.

Li atingis la vilaĝon kaj komencis eniri en
ĉiun korton. Li kantis kaj la dresita urso lu-
dis. Ĝia tintilo sonoris. La dommastrinoj do-
natis monon kaj manĝaĵojn al la ursodresisto.
Post li kuris la infanoj. Ili timeme rigardis
la urson, sed malgraŭ tio sekvis ĝin.

Vesperigis. La cigano elpetis permeson de
unu vilaĝano — baj Stojan, tranokti en lia
pajlejo. Baj Stojan estis maltrankvila kaj nur
diris:

— Bone, estu tiel. . .

La cigano alligis al trabo la urson. Post
tio li manĝis, kuŝiĝis sur la pajlo kaj mallaŭ-
te ekkantis:

Havis kutimon Todora
iri vespere por akvo.
Tie Todora renkontis
sepdek belegajn bravulojn.
Sepdek bravulojn-kunfratojn
kun tri standardoj skarlataj. . .

Momĉil, la filo de baj Stojan, aŭskultadis
la kanton de la cigano. La kanto plaĉis al li
kaj memorigis al li pri liaj kamaradoj-parti-
zanoj, kiuj estis en la densa arbaro de la mon-
teto Kara Bair.

Dum la nokto policianoj ĉirkaŭis la vilaĝon.
Matene ili komencis aresti antifaŝistojn. Mom-
ĉil vestis sin en malnovaj ĉifonvestoj, malli-
gis la urson kaj ekkondukis ĝin. Li metis mal-

alte sur la frunto la peltoĉapon, ektiris la
arĉon sur la kordoj de la guzlo. Atinginte la
lastajn domojn de la vilaĝo, li renkontis du
policianojn. En tiu momento li turnis sin al
la urso kaj abrupte tiris la ferkondukilon. La
besto ektemis kaj ekmuĝis. La policianoj li-
berigis la vojon antaŭ la ursodresisto kaj unu
el ili malice diris:

— He, kia granda urso. . .

Momĉil estis ekscitita kaj brulis de deziro
pli rapide eliri el la vilaĝo. En la proksima
apudvoja arbareto li ligis la urson kaj post
tio eniris en la densan arbaron de la monteto
Kara Bair.

En tiu tago la policianoj ne sukcesis aresti
la plej grandan revoluciulon en la vilaĝo. . .

Post multaj jaroj, kiam Momĉil jam estis
generalo en la Popola Armeo, li vizitis sian
naskiĝvilaĝon Orlinci. Tie, okaze de la 40-
jariĝo de la socialisma revolucio, oni devis
inaŭguri monumenton al la herooj, pereintaj
en la kontraŭfaŝisma batalo. En tiu sama tago
la vilaĝon vizitis ankaŭ unu tremaljuna urs-
kondukisto. Li haltis proksime de la vilaĝa
placo kaj observante la solenaĵon, komencis
tiri la arĉon sur la guzlokordoj kaj ekkantis:

Havis kutimon Todora
iri vespere por akvo.
Tie Todora renkontis
sepdek belegajn bravulojn. . .

DIMO TRUDOLJUBOV,
Jambol

VEKIGU

Vekiĝu, vi homoj sur la tero
kaj faru vi unu grandan rondon.
Leviĝu kiel ŝtalmur' al vera
batalo por paco en la mondo.

Vekiĝu do, ĉar ne estas tempo.
Por vi oni fosas nigran tombon.
Vekiĝu kontraŭ milit'-dilemo
plej grava nun por la tuta mondo.

Ankoraŭ ne sekigis angoraj larmoj,
ankoraŭ ne ĉesis la lamentoj.
Kion vi lasos al la idaroj,
kia estos via testamento?

Vekiĝu, homoj de ĉiuj landoj.
Leviĝu firme kontraŭ milito.
Ne! — diru al ĉiuj militbandoj.
Ne! — al ĉiu militist'-bandito.

Se vi volas, ke vin benu la idaro,
batalu kuraĝe por la paco.
Vekiĝu, vekigu, ho, homaro!
Batalu obstine kaj sen laco.

ASEN TOTEV LINOV
v. Aleksandrovo,
distrikto de Loveĉ



80-JARA JUBILEO



La 10-an de aŭgusto ĉi-jare Bojil Draganĝikov el Kotel fariĝis 80-jara. Avo Bojil, kiel ni ame lin nomas, jam de la junaĝo ligis sian vivon kun la E-movado. Sciama, helpema kaj energia, li partoprenis ĉiujn pli gravajn aranĝojn de la distrikta esperantista organizaĵo kaj dokumentis ilin kun la lerteco de profesia fotisto. La malnova revo de avo Bojil pri establo de Esperanto-societo en Kotel, efektiviĝis en junio ĉi-jare. La nova societo, fondita kun la helpo de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto, portas la nomon de d-ro Zamenhof.

La 11-an de aŭgusto en la domo de avo Bojil kolektiĝis esperantistoj el Sliven kaj Kotel kaj reprezentantoj de la Komunuma Komitato de Patrolanda Fronto. Kun vortoj de danko kaj amo al la jubileulo estis prezentitaj donacoj. Estis tralegita la saluttelegramo de CE de BEA. En amika konversacio ĉirkaŭ la manĝotablo oni rakontis rememorojn de foraj jaroj. La jubileulo montris fotojn kaj malnovajn Esperanto-eldonaĵojn el sia riĉa privata arkivo.

La sekvan tagon avo Bojil ekkondukis

grupon de slivenaj esperantistoj piede tra la Balkanmontaro al Jeravna. Laŭ malnovaj, forgesitaj voĵetoj, aŭ rekte tra la arbaro ni atingis la vilaĝon. Tie ni gastis al avo Kosta, kiu loĝas en Pazarĝik, sed la someron pasigas en sia naskiĝloko Jeravna. Avo Kosta — vigla kaj tondrovoĉa esperantisto-veterano — promenis nin tra la vilaĝo, kie ĉiu domo estas historio. Kun espero pri novaj renkontiĝoj ni disiĝis kun tiuj amindaj maljunuloj kaj direktiĝis al Sliven.

Ĉ. KANTARĜIEV

UNUA INTERNACIA RENKONTIGO DE BLINDULOJ

Laŭ iniciato de la Komisiono pri Esperanto ĉe la Asocio de Blinduloj en Bulgario (ABB), kun la aktiva helpo de CE de BEA kaj de la Centra Konsilantaro de ABB de la 1-a ĝis la 8-a de septembro ĉi-jare en la Internacia E-kursejo (IEK) — Pisanica, okazis la unua internacia renkontigo de blindaj esperantistoj en nia lando. Partoprenis ĉirkaŭ 40 homoj el Bulgario, Hungario kaj Ĉeĥoslovakio.

La bulgaraj nevidantaj esperantistoj dediĉis la renkontigon al la 40-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario. La solenan malfermon ĉeestis la prezidanto de ABB Janaki Gradev. Li parolis pri la vivo kaj agado de la nevidantoj en socialisma Bulgario.

La programo inkluzivis prelegojn (pri kuracado de la nevidantoj, pri lingvaj problemoj — unu el lektoroj estis la ĝenerala sekretario de BEA Kunĉo Vâlev, pri partopreno de blinduloj en Bulgario en la E-movado), ludojn, belartan vesperon, ekskursojn, renkontigon kun d-ro D. Blanke (GDR), spertintersaĝon pri organizaj problemoj.

La partoprenantoj en la renkontigo ricevis salutleteron de la leningradaj esperantistoj.

Dank' al la prizorgo de la estraro de IEK la renkontigo pasis tre altnivele. Estas ideo, ke tiu iniciato fariĝu tradicia, kio kontribuos al la amikeco kaj kunlaboro inter la nevidantaj esperantistoj, por paco en la mondo.

VLADIMIR JELEV



STANKA PENČEVA

AŬTUNO

Mi ne povis esti printempo via, la branĉeton floran-
tan forŝiris alia.
Mi ne povis esti somero via — en la riveroj varmaj,
blankaj sin banis alia.
Estu mi via aŭtuno. Mi pezos en viaj manoj, matura
kaj ora.
En vian koron sin verŝos dolĉo mia kaj farigos vino
juna aŭtune sango via.
Mi mem sternos mian vestaĵon kiel flavan varman
foliaron.
Kaj kvietigita kaj ne karesata apude mi kuŝos silenta,
senbrua.
Ne tondros ŝtormoj printempaj, ne estos varmeĝoj
juliaj.
Per tenero silenta mi vin plenigos, per odoro poma
kaj io... sennoma.
Kvazaŭ aŭtunaj araneaĵoj malpezaj vin tute enplektos
kaj iun tagon vi levigos mirante — falis neĝo kaj ni
fariĝis blankaj.

El la bulgara: ASEN GRIGOROV

DAMJAN P. DAMJANOV

HIPNOTO

Super mi turnas sin firmament'
kaj veturas sub mi globo tera.
Songe pluvas plaŭdanta torent'.
Tra mi kantas ventego infera.
En oreloj eksonas trumpet'.
Per naŭ ringoj min kaptas obskuro.
Forte saltas sub mi la planed'.
Batas ŝtorme la koro-tamburo.

Mi frenezas, frenezas! Doktor',
vi aŭskultu ĝi kiel martelas.
Estas plena de frosto la kor',
pro sufero la koro ribelas.
Mi frenezas! Aŭskultu do vi
ĝian bruon kaj ĝian doloron!
Fiksas vi la rigardon al mi,
kaj l'okuloj atingas la koron.
Per malvarma, terura esplor'
vi nudigas kaj min kaj la koron,

kaj mi restas sen vest' — nura kor' —
kaj mi frostas kaj sentas doloron.
Ho aŭtundu! Ne faru, doktor'!
Mian koron ne tuŝu per ungoj!
Ĝin almenaŭ kompatu: la kor'
jam sangadas pro vundoj profundaj!...
Min arestas du muroj; ĝarden'
en printempo floradas ekstere.
Mi en song' renaskiĝas — kaj jen
en la manoj avinaj mistere
sur ikono silentas sanktul'.
Ŝi preĝadas: „Ho vivu li nure!“
Sed la granda malplena okul'
de l'ikono ridaĉas terure.
Kaj mi levas la pugnon, kun bru'
la ikonon faligas kolere,
al neniu nun preĝos mi plu
nun sen Dio mi restas surtere!...
Min arestas du muroj en sorĉ'.
Kuras vento kaj lumas la suno.
Mi baraktas kaj ploras en song'...
Bluokula knabino en lumo
kuras rekte al mi kun la vent'.
Mi ŝin vokas. Sed vento-infero
baras nin... En haoselement'
ni nin serĉas ĝis nun sur la tero.
Sur la vojo larĝega de l'ter'
iras mi, iras mi al la steloj,
sed sur ĝi estas sango, sufer'
de l'murditaj gevoj ribelaj.
Jam la vojon balaas la vent'
kaj paliĝas subiro purpura.
Almozpetas sur voj' infanet',
ja almozas la lando pli frua.
Kaj sonadas pri Inĝe la kant'.
Rikoltistoj malbenas la sorton.
Barbigintaj, teruraj, tra flam'
kun tambur' marŝas viroj al morto.
Ia tomb' malfermiĝas kaj jen
tuj tratondras al mi jam konata
vira voko, naskita sub herb':
„Ĉu tagiĝas jam, fratoj amataj?“
Sur lavita kaj brila pavim'
de l'milito blindul' piediras.
Super li la nova uzin'
eĉ la sunon atingi deziras.
Ie sonas pri Inĝe la kant'.
Iu svingas per tuko purpura.
Pendigiloj, kaj serpoj, kaj sang'
miksas sin en la songo terura.
Ree ĉi bluokula knabin'
vokas min el la griza nubaro.
Ho, kriegas la tero-patrin',
kaj ĝin sekvas la tuta homaro.
Mia kor' frostotremas. Doktor',
diru, kara, vi diru la veron:
ĉu bezonas vi multe da tempo —
eble kelkajn tro longajn jarcentojn —
por kuraci ne min, sed la teron?

Jes, la teron. Ĉar pezas ĝi, pezas
sur la brust' kiel ŝtono. Doktoro,
vi la teron kuracu. Kaj poste,
kredu vi, sola de la doloro
la anim' resaniĝos. Sana estos ĝi! Estos!

Mi frenezas, frenezas! Doktor',
vi aŭskultu: la koro martelas.
Ĝi forjetas la froston eksteren.

Lacigita de longa labor',
en la nokt' ĉu vi ploras, doktoro?

Tradukis: VENELIN MITEV

ni recenzas



TRIBUNO DE PROLETAJ ESPERANTISTOJ

Sub influo de la Oktobra revolucio ankaŭ en nia lando ekĝermis laborista Esperanto-movado. Baldaŭ post la Unua Mondmilito, laŭ iniciato de Panajot Kolev estis fondita laborista Esperanto-organizaĵo „Balkana Liberiĝa Stelo“ kun sidejo en Sofio. Ĝi ekzistis ĝis la jaro 1925, kiam la faŝista regpotenco malpermesis ĝian agadon.

Tamen la teroro ne sukcesis sufoki la libersopiron de la bulgara popolo. En la fino de la dudekaj jaroj komenciĝis nova impeto. Ekaperis diversaj informaj kaj kulturaj revuoj. En 1929 komencis aperi sub la redaktado de At. Lakov kaj N. Aleksiev, kun administranto Simeon Petrov, la modesta revuo „Balkana Laboristo“. Kiel estas konate el la historio, de la laborista movado, iuj gazetoj servas kiel iniciatantoj kaj organizantoj, kiel

tribuno. „Balkana Laboristo“¹ estiĝis lumturo, ĉirkaŭ kiu kolektiĝis progresemaj esperantistoj-laboristoj, instruistoj, studentoj kaj aliaj. Sur ĝiaj paĝoj trovis lokon korespondadoj kaj informoj pri la laborista Esperanto-movado en la mondo kaj speciale pri Sovet-Unio.

Kamarado Dimitar Papazov, diplomita historiisto, havis la bonan ideon esplori la enhavon de „Balkana Laboristo“. Li tuŝas preskaŭ ĉiujn rubrikojn de la gazeto — organizaj problemoj, tradukarto, originala verkado ktp. „La ĉefa merito de „Balkana Laboristo“ — substrekas la aŭtoro — konsistas en tio, ke ĝi formis la ideologian bazon de la estonta BuLEA kaj preparis la grundon por ĝia fondiĝo.

La broŝuro estas verkita en bona stilo, redaktita de nia meritplena kamarado N. Aleksiev. Legantoj, kiuj interesiĝas pri la historio de la bulgara Esperanto-movado, havos valoran helpilon. La verko estas havebla ĉe CE de BEA.

Ĥ. I.

¹Dimitar Papazov, „Revuo „Balkana Laboristo“ — tribuno kaj organizanto de laboristaj esperantistoj en Bulgario“ (1929—1931).

AMIKECO DE BULGARAJ KAJ JAPANAJ INFANOJ

Laŭ iniciato de la instruisto kaj aktiva esperantisto el Pazarĝik Petko Arnaudov kaj Hideo Hasiguti — aktiva aganto de la movado de pabatalantoj en Japanio, inter bulgaraj kaj japanaj gelernantoj kaj iliaj instruistoj kreiĝis kora amikeco.

Adeptoj de la movado „Standardo de la paco“, la infanoj el III-a elementa lernejo „Georgi Dimitrov“ en Pazarĝik interŝanĝas lernantajn ekspoziciojn kun siaj samaĝuloj el lernejo „Toyotu Daiiti“ en urbo Suita, Japanio. Sub la rekta gvidado de Ilia Tolev, inspektoro en Direkcio „Popola Klerigado“ kaj de la multjara instruistino de pentroarto Kostadinka Dimova, estis elektitaj kaj senditaj al Japanio pli ol 80 infanaj pentraĵoj kaj 15 popolstilaj pupoj el la regiono de Pazarĝik, el kiuj mem la prezidanto de la komunuma pedagogia laboratorio en Suita — Higaŝitani Katuzi, arangis ekspozicion, kiu estis demonstrita en 36 elementaj lernejoj de urbo Suita (kun 340 000 loĝantoj), kiu en 1970 estis dommastro de la Monda Ekspozicio. La ekspozicio estis akceptita kun granda intereso. En specialaj rubrikoj kvar japanaj ĵurnaloj: „Asahi“, „Mainiĉi“, „Jomiuri“, kaj „Sankej“ ne ŝparas la superlativojn pri la etaj bulgaraj pentristoj.

Nun la infanoj el Pazarĝik atendas ekspoziciajn de siaj junaj japanaj amikoj.

Bulgaraj esperantistoj pereintaj en la kontraŭfaŝisma batalo

Okaze de la 30-jara jubileo de la popola venko en Bulgario gazeto „Bulgara Esperantisto“ en sia duobla numero 10—11 por 1974 publikigis nomaron de la konataj ĝis tiu tempo bulgaraj esperantistoj, pereintaj en la batalo por libero kaj socia justeco. La plua elserĉo tiurilate daŭrigis kaj nun ni publikigas la nomojn de la noveeltrovitaj herooj. Ankaŭ nun ni firme kredas, ke nia dua nomaro same ne entenas ĉiujn nomojn de la falintaj en la batalo. Denove ni petas ĉiujn legantojn sciigi al ni la nomojn de la herooj, mankantaj en niaj du nomaroj.

La nomojn ni vicigas sammaniere, kiel en la unua nomaro — laŭ distriktoj kaj kronologie laŭ datoj de pereigo. Nomojn de pereintoj, kiuj agis pli longe ne en sia naskiĝdistrikto, sed en alia, ni metas en tiun lastan. Ni daŭrigas la sinsekvajn numeradon. La lasta cifero de la unua nomaro estis 116. Nun ni komencas per 117.

Ambaŭ nomarojn ellaboris nia redakciano Krâstju Karucin.

Mallongigoj:

BKP — Bulgara Komunista Partio
BKMS — Bulgara Junkomunista Unuiĝo
RMS — Laborista Junulara Unuiĝo (klasbatala)
BONSS — Bulgara Generala Popola Studenta Unuiĝo (klasbatala)
DK — Distrikta Komitato
RK — Regiona Komitato

Burgas

117. **Georgi Kostadinov Apostolov** — nask. 6.VIII. 1914 en u. Lozengrad (Turkio). Loĝis en Burgas. Teknikisto. Membro de BKP. Pro revolucia agado en la kazerno arestita kaj mortigita en u. Ĝjumjurgina (Greklando) (6. VI. 1943).

118. **Atanas Manĉev** — nask. 28.I.1921 en u. Kableŝkovo. Sekretario de DK de RMS. Politikomisar de partizana trupo. Poeto-partizano. Pereis en interpafado kun la polico en u. Ajtos. (21.V.1944).

Gabrovo

119. **Botju Penev** — nask. 29. III. 1920 en v. Katranĝi. Fondis la organizaĵon de RMS en sia naskiĝvilaĝo. Pro revolucia propagando en la kazerno mortkondamnita en 1941. Pendigita en la korto de la kazerno en u. Pleven (25. VI. 1942).

120. **Kanĉo Rajkov** — nask. 2. IV. 1924 en v. Ĵivko. Lernanto. Membro de RK de RMS en Sevlievo. Arestita en la fino de 1942, mortigita en la policejo de Sevlievo (16. I. 1943).

121. **Denju Georgiev Denev** — nask. 26. XI. 1911 en v. Plakovo, distrikto de V. Târnovo. Loĝis en Gabrovo. Kudristo. Membro de DK de BKP. Politmalliberulo (1935—1939). En aprilo 1942 aliĝis al la partizanoj. Pereis la 22-an de januaro 1943.

122. **Atanas Stojanov Vlaĵev** — nask. 11. I. 1922 en v. Gorna Rosica. Kudristo. Membro de RMS. Partizano. Malsaniĝis kaj restis en v. Krâvenik. Kapitita kaj mortigita (7. XI. 1943).

Ĥaskovo

123. **Nikola Petkov Terziev** — nask. 19. II. 1910 en v. Ezerovo, distrikto de Plovdiv. Loĝis en Ĥaskovo. Carpentisto. Membro de DK de BKP. Pasigis ses jarojn en malliberejo. Post la liberigo denove frontis la partian organizaĵon en Ĥaskovo. En 1943 aliĝis al partizana taĉmento. En granda batalo sur Rodopi-Montaro, la 30-an de junio 1943 li estis vundita kaj kaptita. Post kruela turmentado mortigita en la policejo en u. Plovdiv (2. VII. 1943).

124. **Mojs Josif Benbasat** — nask. en februaro 1912 en u. Ĥaskovo. Tabaklaboristo. Sekretario de DK de RMS. Suferis kelkjaran malliberigon. Rost la liberigo loĝis en u. Plovdiv. Arestita en la komenco de majo, mortpafita kune kun du aliaj arestitoj apud v. Spahievo (24. V. 1944).

125. **Petar Angelov Dimitrov** — nask. 6. V. 1918 en v. Karaklise (Greklando). Loĝis en v. Malki Voden distrikto de Ĥaskovo. Gimnazion finis en Ĥaskovo. Kiel studento agis en BONSS. Pro la komunista agado en la militista lernejo por rezervaj oficiroj en Sofio mortkondamnita. Mortpafita sur la Militista Pafejo en Sofio (18. VI. 1944).

Jambol

126. **Georgi Georgiev (Oĝo)** — nask. 28. VIII. 1897 en u. Jambol. Poŝtisto. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝisman Ribelon en 1923. Politmalliberulo (1927—1930). Membro de DK de BKP. Mortigita en la policejo en u. Sliven (4. III. 1942).

127. **Kolju Tenev (Revaŝolata)** — nask. 18. I. 1910 en v. Tenevo. Membro de DK de BKP. Dum 1935—1940 suferis malliberigon. En oktobro 1941 farigis partizano. Pereis en batalo apud v. Ĥanovo (21. II. 1943).

128. **Kosta Stamenov Mihalev** — nask. 21. XII. 1921 en v. Ksanti (Greklando). Loĝis en u. Topolovgrad. Suisto. Membro de RMS. Kiel soldato aliĝis al soldata partizana taĉmento „Ĥristo Botev“. Pereis en batalo apud v. Batulija, distrikto de Sofio (23. V. 1944).

129. **Lambo Ganev Kalinov** — nask. 20. X. 1921 en v. Dumupeler. Loĝis en u. Topolovgrad. Membro de RMS. Kiel soldato aliĝis al soldata partizana taĉmento „Ĥr. Botev“. Pereis en batalo apud v. Batulija, distrikto de Sofio (23. V. 1944).

130. **Prodan Brajkov** — nask. 10. XI. 1920 en v. Ljulin. Membro de RMS. Kiel soldato aliĝis al soldata partizana taĉmento „Ĥristo Botev“, poste al Rilo-Pirina partizana taĉmento. Pereis embuske proksime al u. Stara Zagora (14. VIII. 1944).

Kjustendil

131. **Petra Lesiĉkova** — nask. 25. V. 1924 en u. Stanke Dimitrov. Membro de RMS. Aliĝis al partizana taĉmento „Kosta Petrov“. Pereis en batalo apud v. Eremija (25. VI. 1944).

132. **Ljuben Ŝilgarski** — nask. 27. VIII. 1920 en v. Balanovo. Studento. Membro de RMS kaj de BONSS. Partizano en taĉmento „Kosta Petrov“. Pereis en batalo apud v. Eremija (25. VI. 1944).

133. **Georgi Sokolov** — nask. 11. IV. 1915 en v. Gorna Koznica. Membro de BKP. Vickomandanto de partizana taĉmento „Kosta Petrov“. Pereis en batalo apud v. Eremija (25. VI. 1944).

Loveĉ

134. **Calo Panov Pelteŝki** — nask. 12. I. 1912 en u. Uĝârĉin. Panbakisto. En iuj jaroj laboris en Hungario. En 1931 membris al BKP. En 1937 atingis Hispanion por partopreni la Internaciajn Brigadojn. Vundita dum la bataloj apud Harama. Post la sufoko de la popola registaro elmigris en Francion, kie suferis koncentrejon. Post la reveno en Bulgariion fariĝis partizano. Arestita pro denuncio, mortigita en la malliberejo en u. Skopje (Jugoslavio) (10. VI. 1943).

135. **Petar Kraev Groŝev** — nask. 29. VI. 1924 en v. Sâevo. Lernanto. Membro de RMS. Partizano. Pereis en batalo apud v. Borima (30. XI. 1943).

136. **Ivan Todorov Dončev** — nask. 6. XI. 1926 en v. Dălbok Dol. Lernanto. Partizano. Pereis en batalo apud v. Borima (30. XI. 1943).

137. **Ilija Šojkov** — nask. 12. XI. 1915 en u. Ugărčin. Teksisto. Membro de BKP. Vickomandanto de partizana trupo. Pereis apud v. Stojanovo (7. I. 1944).

138. **Vasil Bočev Vatev** — nask. 17. IV. 1918 en v. Dălbok Dol. Studento. Membro de RMS kaj de BONSS. Politkomisaro de partizana taĉmento „Hristo Kărpačev“. Trapafita apud lia naskiĝvilaĝo (12. III. 1944).

139. **Tončo Staeovski** — nask. 3. XI. 1924 en u. Trojan. Lernanto. Membro de RMS. Estris batalgrupon. Partizano en taĉmento „Hristo Kărpačev“. Mortpafita la 11-an de aprilo 1944.

Mihajlovgrad

140. **D-ro Stamen Iliev** — nask. 3. X. 1883 en v. Jelezna. Loĝis en Mihajlovgrad. Kuracisto. Membro de BKP. Cefkuracisto de la hospitalo de la ribelantoj en Mihajlovgrad en 1923. Mortigita proksime al Mihajlovgrad (30. IX. 1923).

Pazarĝik

141. **Stojan Georgiev Bojkov** — nask. 23. III. 1895 en u. Batak. Loĝis en Pazarĝik. Advokato. Membro de DK

de BKP. Arestita la 12-an de septembro 1923 lige kun la preparo de la Kontraŭfaŝisma Ribelo, mortpafita kune kun aliaj arestitoj ĉe la sabla bordo de rivero Marica apud u. Pazarĝik (24. IX. 1923).

142. **Stojan Iv. Krajčev** — nask. 29. IV. 1900 en v. Gerovo. Membro de BKP. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝisman Ribelon en 1923. Mortpafita apud sia naskiĝvilaĝo (26. IX. 1923).

143. **Georgi Julev** — nask. 4. III. 1904 en v. Lesiĉevo. Instruisto. Partoprenis la Septembran Kontraŭfaŝisman Ribelon en 1923. Sekretario de RK de BKP. Vilagestro de Lesiĉevo. En 1934 elmigris en Sovet-Unio. Partoprenis la Internaciajn Brigadojn en Hispanio kiel tankistoficiro. Pereis en la batalo apud Madrid (18. VII. 1937).

144. **Ralčo Sapungiev** — nask. 20. VII. 1923 en u. Panagjuriŝte. Sekretario de RK de RMS. Politkomisaro de partizana trupo. Pereis apud v. Băta (27. VII. 1943).

145. **Nikola Dimitrov Radkov** — nask. 14. X. 1908 en v. Varvara. Laboristo. Sekretario de la organizado de BKP en la vilaĝo. En 1943 aliĝis al partizana trupo „Koĉo Ĉistemenski“. Mortpafita apud v. Semĉinovo (1. II. 1944).

(Daŭrigota)

FORPISIS MELEŜKO ŜIŜKOV

La 17-an de septembro 1984 en Sofio forpasis nia kara Baj Meleŝko — pioniro kaj veterano de la laborista esperantista movado en Bulgario, arda kaj kuraĝa batalanto kontraŭ la faŝismo, mirinde obstina disvastiganto de la esperanta literaturo.

Meleŝko Nikolov Ŝiŝkov naskiĝis en 1892 en u. Bunar Hisar (Turkio). En Bulgarion li venis en 1912, partoprenis la Balkanan Militon kaj la Unuan Mondmiliton. Ekloĝis en Sofio en 1920 kaj fariĝis kudristo de vatitaj dormokovriloj. Aktive partoprenis la agadon de la batalpretaj sindikatoj kaj membriĝis al la Bulgara Komunista Partio. Lia laborejo fariĝis kaŝejo de nelegalaj antifaŝistaj presaĵoj, en la jaroj 1932—1934 en lia domo estis instalita nelegala presejo. En decembro 1941 en lia domo la polico trovis armilaron kaj li ricevis mortverdikton. La verdikton oni ne plenumis, sed ankaŭ ne nuligis ĝin. Do, tri jarojn Meleŝko Ŝiŝkov vivis kun ŝnurego ĉirkaŭ la kolo. Lin oni translokiĝis en la malliberejon de urbo Skopje (Jugoslavio) ĉe plej severa gardado. En la komenco de septembro 1944 la politikaj malliberuloj en tiu prizono ribelis kaj sukcesis fuĝi en la montaron. Post multaj krizmomentoj ili atingis la jam liberigitajn patrujojn. Post la liberigo li oficis kiel librovendisto en la Bulgara Esperantista Kooperativo.

Esperanton li lernis en 1921 (en kurso de Panajot Kolev, konata laborista esperantisto). Li estis unu el la dekkvin fondintoj de la Komunista Esperantista Grupo „Balkana Libe-

riga Stelo“ en Sofio kaj ekde tiam li seninterrompe partoprenis la Esperanto-movadon. Tuj post sia esperantistiĝo li aliĝis al SAT kaj membris en ĝi ĝis tiu asocio ne perdis la ideojn de la laborista klaso. Li partoprenis la fondon de Laborista Esperantista Asocio en Bulgario en 1930 kaj aktivis en ĝi precipe sur la kampo por disvastigo de ĝiaj eldonaĵoj. Antaŭ la 9-a de septembro 1944, kiam li estis en la Centra Sofia Malliberejo, li kontribuis por la eldonado de la nelegala manskribita esperanta gazeto „La Kajero“. Post sia emeritiĝo li fariĝis libervola, nepagita kolportisto de esperantaj libroj. Dum dekoj da jaroj, ĝis nur antaŭ 3—4 jaroj, la sofiaj esperantistoj dum siaj regulaj merkredaj kunvenoj vidadis lin aranganta sian stendon en la kunvenejo. Li timis nek varmon, nek froston. Li ne ŝparis la klopodojn por ekspedi librojn en la provincon.

Lian indan socipolitikan agadon la popola registaro alte rekonis. Li estis distingita per multaj ŝtataj ordenoj kaj medaloj, inkluzive la plej altan ŝtatan ordenon „Georgi Dimitrov“. Okaze de lia 90-jariĝo la prezidanto de la Stata Soveto k-do Todor Jivkov adresis al li salutleteron. Li estis honora membro de BEA, dekorita per la ora honora insigno de BEA kaj per la asocia medalo „Pro Merito“.

La memoron pri la inda kaj sindona esperantisto kaj sociaganto Meleŝko Ŝiŝkov la bulgaraj esperantistoj konservas por ĉiam.

KR. KARUCIN

HONORE AL LA JUBILEO

La 40-jara jubileo de la socialisma revolucio en Bulgario kunvenigis la 17-an de septembro j. k. en la salonon de teatro „Sofia“ multajn ĉefurbajn esperantistojn. Detalan raporton lige kun la datreveno prezentis la sekretario de CE de BEA Dimităr Papazov. Li parolis pri la rapidega disvolviĝo de nia lando dum la jaroj de popola regado, pri la aktiva partopreno de la bulgaraj esperantistoj en la laboro por realigo de la nuna strategia tasko, starigita de la XII partia kongreso: alta kvalito en ĉiuj sferoj de la materiala kaj spirita produktado. La oratoro substrekiis ankaŭ la progreseman rolon, kiun ludis la E-movado dum la periodo de batalo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo — de la antifaŝista ribelo en 1923 ĝis la popola venko je la 9-a de septembro 1944.

En la nomo de CE de BEA ĝia prezidanto Hristo Gorov enmanigis la honorajn insignojn de BEA al la distingitaj okaze de la jubileo batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo aktivaj esperantistoj el Sofio: Nano Kjuĉukov — vicprezidanto de CE de BEA, Zahaŭri Ivanov — membro de la Buroo de DE de BEA, Haim Levi — vicprezidanto de la Sofia UE de BEA, Violin Oljanov — ĉefredaktoro de revuo „Paco“, Cano Ignev — membro de la Buroo de la Sofia UE de BEA, Ivanka Spasova — honora prezidantino de E-societo „Solidareco“ en Bankja, Ljuben Grozdanov — prezidanto de III subdistrikta E-societo kaj Conka Hristova — membro de I subdistrikta E-societo.

Post la oficiala parto artistoj el teatro „Sofia“ prezentis bulgarlingve spektaklon laŭ la novelo „Tango“ de Georgi Karaslavov.

MARIA JANKOVA

E-RENKONTIGO EN ORJAĤOVO...

La Dua Renkontiĝo de Bulgaraj Esperantistoj el Apuddanubaj Loĝlokoj okazis fine de julio denove en Orjaĥovo. La Renkontiĝo estis dediĉita al la 40-a jubileo de la socialisma revolucio kaj al la 50-a datreveno de la 21-a bulgara E-kongreso, okazinta en Orjaĥovo.

La unuan tagon oni promenis ĝis la „Stojnoj“ — antikvaj kastelruinoj.

La sekvan tagon en la Junulara Domo „G. Dimitrov“ okazis la oficiala renkontiĝo, kiun ĉeestis ankaŭ la membro de la komunuma partia komitato Dimităr Cvetkov.

Nadejda Bosjaška — prezidantino de E-

societo „Georgi Stanev“ en Orjaĥovo, raportis pri la agado de la E-societo. Salutparolis St. Vojĉev kaj T. Radeva el Ruse, B. Mladenov el Vraca, D. Stojanov el Gorna Orjaĥovica. Konklude Panka Pangelska — vicprezidantino de la komunuma soveto kaj prezidantino de la komunuma fako pri kulturo, parolis pri Orjaĥovo, pri ĝia historio kaj pri la antaŭstaranta oficiala festado venontjare lige kun la 800-jariĝo de la urbo.

La reprezentanto de CE de BEA Ivan Keremidĉiev salutis la esperantistojn de Orjaĥovo proilia bonega iniciato — renkontiĝo de apuddanubaj esperantistoj — kaj sciigis, ke venontjare, post la 41-a kongreso de BEA (julio 1985), multaj kongresanoj kaj eksterlandaj gastoj partoprenos la Trian E-Renkontiĝon en Orjaĥovo.

La partoprenantoj en la Renkontiĝo ĝuis varian programon — recitoj, kantoj, baletoj de la junula dancensemblo de nia samideano J. Jumerov.

La gastoj de Orjaĥovo vizitis dufoje insulon „Esperanto“, kie estis organizita oratora konkurso en Esperanto. Prezidanto de la ĵurio estis Kr. Karucin — membro de la Buroo de CE de BEA.

...KAJ EN LOM

...Dum la jubileaj tagoj de la glora Naŭa-septembra socialisma revolucio kaj lige kun la tradicia urba foiro en la apuddanuba urbo Lom, la membroj de la loka E-societo „Sukceso“ gastigis geesperantistojn el Orjaĥovo, Sofio, Gorna Orjaĥovica kaj aliaj loĝlokoj.

La renkontiĝo, malfermita de la prezidanto El. Todorov, okazis en la Domo de la Popola Armeo. En la nomo de CE de BEA la ĉeestantojn salutis Iv. Keremidĉiev. Estis projekciita interesa filmo pri historiaj, arkeologiaj kaj aliaj vidindaĵoj de Lom (la antikva Almus). Poste la gastoj vizitis la interesan foiron, la Urban Muzeon, la Bargon-Muzeon sur la danuba bordo, el kies holdo estis elĵetitaj en Danubon kaj dronigitaj septembranoj-ribeluloj en 1923.

IV. ES.

HELPU DOKTORIGI!

Mi preparas disertacion „Interlingvistikaj konceptoj ekde 1945“, bezonas ajnajn interlingvistikajn periodaĵojn, artikolojn, librojn, lingvoprojektojn kaj informojn pri ili. Rekompenco laŭ interkonsento. Aleksandro Melnikov, ab.ja.393, SU—344007 Rostov-Don, Sovetunio.

XIII FOIRA RENKONTIĜO

„La Esperanta kulturo en socialisma Bulgario“ estis la ĉeftemo de la ĉi-jara Foira Internacia Esperantista Renkontiĝo (FIER), dediĉita al la 40-a datreveno de la socialisma revolucio en Bulgario.

En la kadro de FIER estis celebrita grava por la esperantistoj festo — la 50-a datreveno de apero de la laborista E-gazeto „Sturmulo“, kiu estis eldonata en Plovdiv.

En la programo de FIER estis kelkaj interesaj prelegoj: d-ro Peter Broczko el Budapeŝto parolis pri la Informfluo en la hodiaŭa mondo; prof. Stojan Ĝuĝev — pri Esperanto kaj kulturo kaj Belka Beleva — pri la E-kulturo en socialisma Bulgario. Jordan Angelov informis pri iuj problemoj de la E-movado.

En la Kulturdomo en urbo Stambolijski estis malfermita ekspozicio de la plovdivaj pentristoj-esperantistoj Ivan Sivarov, Danĉo Danĉev kaj Metodi Angelov. Pli malfrue okazis literatura-muzika programo, kiun partoprenis Belka Beleva, Anani Anev, Veselin Damjanov kaj aliaj konataj geaktoroj kaj gekantistoj el Sofio kaj Jambol.

La partoprenantoj en la Renkontiĝo vizitis la 40-an Jubilean Internacian Teknikan Foiŝon en Plovdiv. Okazis samtage ankaŭ la tradicia Renkontiĝo de Esperantistoj-Vegetaranoj.

La XIII FIER partoprenis geesperantistoj el 18 loĝlokoj de nia lando kaj el Pollando, GDR kaj Hungario.

VL. JELEV

LISTO

DE E-LIBROJ KAJ E-AJOJ AĈETEBLAJ ĈE LA URBA ESTRARO DE BEA — SOFIO

VAZOV, Iv. — „Sub la jugo: 3.20lv.
ĤRISTOVSKI, Tr. — „Mia vivo“ (aŭtobiografio) 1.47
GRIGOROV, As. — „Gardu la pacon!“ (poemaro) 2.40
VAPCAROV, N. — „Elektitaj versaĵoj“ 0.50
KEMALOV, N. — „Naŭ jarojn en la infero“ (rememoroj) 2.40
VELKOV, Kr. — „Vilaĝo Borovo“ (romano) 0.79
McDERMOTT, M. — „Apostolo de la libereco“ (biografio de v. Levski) 4.26
ALEKSIEV, N. — „Uĉiteli i drugari“ (bulgarlingvaj eseoj) 1.33

Ĉefredaktoro: Donĉo ĤITROV
 Vicĉefredaktoro: Ĥaim LEVI
 Respondeca sekretario: Lidia RAEVA
 Redakta komitato: Marin BACEV, Vasil BOROVANSKI,
 Radoslav DOJĈINOV, prof. d-ro Kiril POPOV, Dimitar
 ĤAĜIEV, Krăstju KARUCIN.

Administranto — ASEN JOSIFOV

ENHAVO

A. T. Tagoj de la Internacia Esperanto-Kursejo	11
D. PAPAŜOV. Fruktodona antaŭkongresa raport- elekta kampanjo	1
Z. IVANOV. Problemoj de la E-instruado	2
D. BLANKE, W. DEHLER. KIK'84 — celoj, spertoj, rezultoj	3,4
M. TODOROVA. Solena celebrego de „Sturmulo“	4
L. DOKOVA. Unua renkontiĝo de E-horoj	4,5
O. CANKOVA. Poeto-romantikulo	6
E. TRIĈKOVA. Felica mi estas	6,7
D. DENEVA. Per Esperanto tra Norda Ameriko	7
M. ANGELOV. Turista marŝo en Pirin-montaro	8
D. ĤITROV. Koncize pri la Literatura Konkurso de „BE“	9
Listo de la premiitoj	9
Konkursajoj	9,10
Niaj veteranoj	11
Ni recenzas	13
KR. KARUCIN. Forpasis M. Siŝkov	15,16
Enlanda movado	16
AS. BOJAĜIEV. En la nova domo de malnovaj konatoj	IV

OLJANOV, V. — „Malfacilaĵoj en la facila Esperanto“ (prilingvaj notoj, bulgarlingve)	0.50
OLJANOV, V. — „Ni lernu plu!“ (lernolibro por II grado)	1.50
OLJANOV, V. — „Al perfektigo!“ (lernolibro por III grado)	1.60
GRIGOROV, As. — „Lernolibro de Espe- ranto“ (por I grado)	1.00
SARAFOV, Iv. k. a. — „Lernolibro de Espe- ranto“ (por I grado)	0.95
GRIGOROV, As. — „Esperanto-bulgara vor- taro“ (poŝformata)	0.50
GRIGOROV, As. — „Bulgara-Esperanta vor- taro“ (poŝformata)	0.50
FUĈIK, Julius — „Riporto skribita kun pendumila maŝo“ (rememoroj, ĉeĥa)	2.40
KUUSBERG, P. — „Somermeze“ (estona romano)	1.50
STANURA, A. k. a. — „Meze de Eŭropo“ (libro pri Ĉeĥoslovakio)	1.40
URBANOVA, Eli — „Panoramo“ (ĉefiaj poe- ziaĵoj)	1.20
BENCZIK, V. — „Baza literatura krestoma- tio“	5.20
GAJDAR, A. — „Timur kaj lia taĉmento“	1,00
CINK, Josef — „Ĉvicebnice esperanta“ (pro- gresiga ekzerclibro)	1.40
SEPPIK, H. — „La tuta Esperanto“ (grama- tiko por progresintoj)	1.35
* * * * *	
* * * * * — Glumarkoj (ĉefiaj)	0.50

Skribu vian mendon ĉiam sur apartan folion kaj perletere sendu ĝin al GRADSKO RAKOVODSTVO na BES, ul. „Il. Makariopolski“, 4, 1202 SOFIA. La sumojn transpagu per poŝtmandato (kun indiko pri la mendo) laŭ konto 185/2553, DSK — 4, Blagoevski rajon, SOFIA. Al ĉiuj prezoj oni aldonas 10% por sendkostoj.


Sur la unua kovrilpaĝo:

En la malnova Trjavna — la domo de popo Kojo,
 elstara lignoĉizisto. Foto: Emilia Kirilova

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919,
 distingita per ordeno „Cirilo kaj Metodio“ — I grado.
 Eldonkvanto 6500 ekz.

Adreso de la redakcio:
 „BULGARA ESPERANTISTO“
 Bul. Ĥristo Botev 97
 1303 Sofio, Bulgario P. K. 66
 tel. 31-70-19 1 000 Sofio
 Ŝtata presejo „Georgi Dimitrov“, bul. Lenin 117

EN LA NOVA DOMO DE MALNOVAJ KONATOJ



Ĝenerala vidaĵo de la nova zooparko

Depost kelkaj monatoj la loĝantoj de la plej malnova sur la Balkana Duoninsulo zoologia ĝardeno ĝuas sian novan loĝlokon. Temas pri la Sofia zooparko, kies unuaj eksponaĵoj aperis jam en 1888 en la ĝardeno de la iama cara palaco (hodiaŭ Nacia Belarta Galerio). Post la „drameca“ transporto de la bestoj en iliajn novajn loĝejojn (kion iu kolego ŝerce komparis kun „safari“, ĉar ĝi kaŭzis multajn klopodojn al la personaro), nun la malnovaj konatoj de sofianoj sentas sin bone kaj renkontas la unuajn vizitantojn en bonega humoro. Laŭ la vortoj de unu el la specialistoj en la zooparko, la elefano estis tiom „impresita“ de la beleco de sia grandega palaco, ke decidis tuj bani sin — io nekutima por ĝi lastatempe.

Nun la nova ĉefurba zooparko, kiu troviĝas en la limoj de la Ĉasparko, estas la plej granda en nia lando. Situenta sur tereno de 230 ardekoj, fakte ĝi ampleksas dekoble pli grandan teritorion ol tiu de la malnova zooparko. Dum la konstruado de la nova zooparko oni faris proksimume 150 000 kubometrojn da foslaboroj, oni miksis 40 000 kubometrojn da betono, oni kunligis 38 kilometrojn da kabloj en 11 instalaĵoj, oni asfaltis terenon de 37 000 kvadratmetroj... Laŭ la ĝenerala plano, post la definitiva finkonstruo de la zooparko (nun estas konstruita ĝia unua etapo) ĝi disponos pri 97 konstruaĵoj kaj ekipaĵoj konformaj al ĉiuj postuloj pri komforto de la bestoj, de la priservanta personaro kaj eĉ de la vizitantoj. Oni planas traveturadon de la vastega teritorio de la zooparko per distra aŭtovagonaro...

Iuj el la jam konstruitaj konstruaĵoj laŭ ĝia mensioj kaj interna aranĝo estas unikaj en la mondo. Tio estas la loĝejoj de la elefantoj, la-

bobestoj, rabobirdoj. Kaj la ursejo okupas terenon grandan kiom estis la tuta malnova zooparko! Dank' al la plej konvena temperatura reĝimo la loĝantoj de la zooparko estos eksponataj tutjare. Ili vivos en kondiĉoj, tre proksimaj al ilia natura medio. Ilia prizorgado estos plej moderna el teknika vidpunkto — per televidkameroj por rekta observado de la kaĝoj, per vico da aliaj aŭtomataj kaj elektronikaj aparatoj, kiuj faciligos la laboron de la flegistoj.

— Kiam la zooparko estos tute preta, ni povos prezenti ne nur 220 kiel nun, sed proksimume 600 bestajn speciojn el la tuta mondo — rakontas la direktoro de la zooparko d-ro Stanĉo Matevski. — Nia deziro estas kolekti tie ĉi relative pli rarajn reprezentantojn de la monda faŭno. Per vasta scienc-praktika laboro ni provos ne nur adapti bestojn al niaj klimatkondiĉoj, sed ankaŭ realigi reproduktadon. Por la celo ni planas fondon de scienca centro kun la necesaj laboratorioj kaj kabinetoj. Ekzistas ĉiuj necesaj premisoj por transformo de la zooparko en instituton de nacia signifo. Ni strebos atingi la nivelon de la plej bonaj modeloj en Eŭropo kaj en la mondo.



Ili jam al kutimiĝis al sia nova loĝejo

La Sofia zooparko estas unika objekto de la naturdefenda afero. Ĝi sendube transformiĝos en ŝatatan lokon por ripozo kaj distro ne nur de la infanoj — plej pasiaj amikoj de bestoj, — sed ankaŭ por la tuta socio. Kiel unu el la vidindaĵoj de Sofio, estonte ĝi certe altiros la atenton ankaŭ de la alilandaj gastoj de la bulgara ĉefurbo.

ASEN BOJAĜIEV